

# Naskiô de Maria

El la Latina tradukita de Gerrit Isai Berveling

*Fonto, el kiu estas tradukita:*

LOS EVANGELIOS APÓCRIFOS

Colección de textos griegos y latinos

versión crítica

estudios introductorios, comentarios e ilustraciones por Aurelio de Santos Otero

segunda edición

Madrid – MCMLXIII

*Interrete:*

*Klarigo en Vikipedio:*

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Libro\\_pri\\_la\\_naskiĝo\\_de\\_Maria](https://eo.wikipedia.org/wiki/Libro_pri_la_naskiĝo_de_Maria)

*La originala Latina teksto:*

ne trovita

*Angla traduko:*

<https://www.newadvent.org/fathers/0849.htm>

*Lastfoje kontrolita: 2020-05-14.*

# *Libro pri la Naskiĝo de Maria*<sup>1</sup>

## *Libellus de Nativitate Sanctae Mariae*

**Enkonduko** Vi petas min fari ion, kio ŝajnas esti ne peza, sed pro zorgemo pri falsado tamen estas grava.

Vi ja petas, ke mi verku pri ĉio, kion vi trovis pri la naskiĝo de la sankta kaj beata virgulino Maria ĝis ŝia nekomparebla nasko kaj la unua tempo de la vivo de Kristo: unuflanke ne tro malfacile por fari, sed, kiel mi jam diris, tre riske koncerne la veron. Ĉar kion nun vi petas de mi, ke mi prenu skribilon por rakonti al vi, pri tio vi scias, ke kiel juna infano mi legis ĝin en iu libreto, kiu hazarde trafis en miajn manojn. Ho kiom da tempo pasis de tiam, kaj kiom da negravaĵoj intertempe preteriris, ke tre leĝere iuj detaloj depost tiam ja povus forgliti el mia memoro! Tial ne estus juste kulpigi min, se mi obeos al via peto, kaj se iun detalon mi forgesus aŭ senintence aldonus aŭ ŝanĝetis, kion mi ja koncedas, ke povas foje tute senintence okazi.

**1** 1 La beata kaj glora ĉiam virga Maria naskiĝis de la reĝa familio de David. Ŝi estis naskita en Nazaret, kaj edukita en la templo de la Sinjoro en Jerusalemo. Ŝia patro estis Joahim, la patrino nomiĝis Anna. La familio

---

<sup>1</sup> Lingve iom mallerta teksto.

de patra flanko devenis el Galileo, de Nazaret, sed de patrina flanko de Betlehem.

2 Ilia vivo estis simpla kaj rekta antaŭ la Sinjoro, ĉe la homoj ĝi estis senriproĉa kaj pia. Ĉar sian tutan havaĵon en tri partojn ili dividis: unu ili atribuis al la templo kaj la temploservistoj, la duan ili donis al pilgrimantoj kaj malriĉuloj, la lastan ili gardis por la bezonoj de sia familio.

3 Tiel ili estis karaj al Dio, piaj antaŭ la homoj; ĉirkaŭ dudek jarojn ili vivis hejme sian ĉastan vivon sen ke naskiĝis infano. Sed ili faris voton, ke, se Dio eble donos al ili idon, tiun ili dediĉos al la servado al Dio: pro tio ĉiujare ili kutimis viziti la templon de la Sinjoro.

**2** 1 Okazis do, ke alvenis la Festo de la Templo-konsekrado, kaj akompanate de pluraj siaj samvilaĝanoj ankaŭ Joaĥim ekiris al Jerusalemo. Tiutempe tamen tie Isaĥar estis ĉefpastro. Dum inter pluraj gastoj tie li rimarkis ankaŭ Joaĥimon kun ties oferaĵo, li malestimis lin kaj mokis liajn oferdonojn, demandante, kiel li arogas al si kiel senfruktulo iri inter fekundaj homoj, dirante, ke liaj oferaĵoj neniel povos aspekti indaj antaŭ Dio, ĉar malbenata estas ĉiu, kiu ne naskis viran idon en Izrael. Do li diris al li, ke unue li liberigu sin de tiu malbeno per naskigo de infano, kaj nur poste li povos iri kun sia oferaĵo antaŭ la rigardon de la Sinjoro.

2 Joaĥim estis grave vundita de tiu hontigo kaj li iris al la paŝtistoj, kiuj kun siaj gregoj estis sur la paŝtejoj; ĉar li ne plu volis reiri hejmen por sin montri al la samtribanoj, kiuj ja ĉeestis kaj aŭdis tion de la ĉefpastro, kiu lin ofendis en la vizaĝon.

**3** 1 Sed kiam tie li estis iom da tempo, unu tagon, kiam li estis sola, alvenis al li kun grandega lumo anĝelo de la Sinjoro. Kiam ĉe tiu vidaĵo li konfuziĝis, la anĝelo, kiu aperis al li, venkis lian timon kaj diris: Ne timu, Joaĥim, kaj ne konfuziĝu pro mia aspekto; ĉar anĝelo de la Sinjoro mi estas, kiu estas sendita de Li por informi vin, ke viaj preĝoj estas aŭskultitaj kaj ke viaj almozoj ascendis antaŭ Lia vizaĝo. Li do vidis vian

honton kaj aŭdis, ke via senideco malprave estis riproĉita al vi: Dio venĝas la kulpojn, ne la naturon. Kaj tial, se ies uteron Li fermas, tion Li faras, por ke des pli mirakle Li malfermu ĝin, kaj ke kio naskiĝos, ne naskiĝos el volupto, sed el Dia donaco.

2 Fakte, ĉu Sara, la unua patrino de via gento, ĉu ŝi ne estis sterila ĝis sia okdeka jaro? Kaj tamen en ekstrema maljuno Isaakon ŝi naskis, al kiu estis promesita la beno de ĉiuj popoloj. Ankaŭ Raĥel, kiu ne nur estis tiom plaĉa al Dio, kiom amata de sankta Jakob, estis longtempe sterila, kaj tamen Jozefon ŝi naskis, kiu fariĝis ne nur sinjoro de Egiptujo, sed ankaŭ liberiganto de tiom da popoloj, kiuj estis mortontaj pro malsato. Kiu el la Gvidantoj estis pli forta ol Samson aŭ pli sankta ol Samuel? Kaj tamen ambaŭ tiuj estis el patrinoj sterilaj. Se do la racieco de miaj diroj ne konvinkas vin, kreu do minimume, ke longe prokrastata koncipiĝo kaj naskado de sterilaj virinoj kutime indikas miraklojn.

3 Tial sciu, ke Anna, via edzino, naskos filinon al vi, kaj vi nomos ŝin Maria; kiel vi promesis, de sia infanaĝo ŝi estos dediĉita al la Sinjoro kaj la Sankta Spirito plenigos ŝin jam ekde la utero de ŝia patrino. Nenion malpuran ŝi manĝos nek trinkos, kaj ŝi ne iros inter la plebamasoj, sed en la templo de la Sinjoro ŝi loĝos, por ke pri ŝi neniam io malbona aŭ abomena povu esti asertata. Kaj tiel, dum la tempo pluiras, same kiel ŝi mem mirakle naskiĝis de sterila virino, tiel en nekomparebla maniero kiel virgulino ŝi naskos la Filon de la Plej Alta, kiu nomiĝos Jesuo: laŭ ties signifo li estos la Savanto de ĉiuj popoloj.

4 Kaj tio estos signo de ĉio, kion mi antaŭdiris: Kiam vi venos ĉe la orumita pordo de Jerusalemo, renkontos vi vian edzinon Anna, kiu zorgoplena pro via malfruiĝo ĝojos, kiam vin ŝi revidos. Post ĉi vortoj, la anĝelo forlasis lin.

**4** 1 Poste li foriris kaj aperis al lia edzino Anna. Li diris: Ne timu, Anna, kaj ne kreu, ke fantasma vi vidas. Mi ja estas anĝelo, kiu viajn preĝojn kaj almozojn portis antaŭ la vizaĝon de Dio, kaj nun mi estas sendita al vi por anonci al vi, ke naskiĝos al vi filino, kiun vi nomu Maria, kaj kiu estos benata pli ol ĉiuj virinoj. Tuj de sia naskiĝo ŝi estos plena je graco

de la Sinjoro, kaj la unuajn tri jarojn ŝi restos en la domo de sia patro ĝis ŝi estos demamigita. Poste ŝi vivos konsekrita al la servo de la Sinjoro en la templo kaj de tie ŝi ne foriros ĝis ŝi atingos la aĝon de kompreno; kaj tiam en fastado kaj preĝado servante al Dio tage kaj nokte, ŝi detenos sin de ĉio malpura, viron neniam ekkonos, sed sola, sen ajna ekzemplo, sen ajna malpuro, sen makulo, sen kontakto aŭ unuiĝo kun viro, kiel virgulino ŝi naskos la Sinjoron, kiu estos laŭgrace, laŭnome kaj laŭfare la Savanto de la mondo.

2 Leviĝu do, supreniru al Jerusalem, kaj kiam vi venos al la pordo, kiu nomiĝas la Ora, ĉar ĝi estas orumita, tie kiel signon vi rekontos vian edzon, pri kies bonfarto vi zorgas. Kiam tio plenumiĝos, vi do sciu, ke kion mi anoncas, sendube plenumiĝos.

**5** 1 Ambaŭ do, laŭ la ordono de la anĝelo, ekiris de la loko, kie ili estis, al Jerusalem, kaj kiam ili atingis la lokon, kiun la anĝelo antaŭdiris, ili sin reciproke renkontis. Ĝojigitaj de siaj propraj vizioj, kaj gajaj pro la promeso de infano, ili diris la ŝuldatan dankon al la Sinjoro, kiu altigas la humilulojn.

2 Tial ili adoris la Sinjoron, kaj hejmen veninte certaj pri la Dia promeso ili ĝojplene atendis. Anna do fariĝis graveda kaj naskis filinon, kaj laŭ ordono de la anĝelo la gepatroj nomis ŝin Maria.

**6** 1 Kiam volviĝis la ciklo de la tri jaroj kaj venis la tempo de la demamigado, kun oferaĵoj ili kondukis la virgulinon al la templo de la Sinjoro. Estis ĉirkaŭ dek kvin ŝtupoj kvazaŭ de la dek kvin psalmoj gradualaj ĉirkaŭ la templo; ĉar pro tio, ke la templo estis konstruita sur monto, estis neeble aliri la altaron de la holokaŭsto, krom per ŝtupoj, ĉar estis ekstere.

2 Sur unu el tiuj ŝtupoj ŝiaj gepatroj do metis la beatan virgulinon, etan Marian. Kiam ili mem demetis la vestaĵojn, kiujn survoje ili portis, kaj laŭkutime sin vestis en pli belaj kaj pli puraj vestaĵoj, la virgulino de la Sinjoro suriris ĉiujn ŝtupojn unuope sen iu gvidado aŭ subteno tiel, ke oni pensus, ke almenaŭ por tio nenio mankas al perfekta aĝo. Ĉar en la

infanaĝo de sia virgulino la Sinjoro efektivigis ion grandan, por ke antaŭmontriĝu per ĉi tiu miraklo, kiel granda ŝi fariĝos.

3 Kiam do la oferado estis laŭ la kutimo celebrita kaj ilia premeso plenumita, la gepatroj forlasis la virgulinon por edukigi ŝin inter la muroj de la templo kun la ceteraj virgulinoj, kaj ili mem reiris hejmen.

**7** 1 Sed la virgulino de la Sinjoro progresis en aĝo kaj virtoj, kaj se eĉ patro kaj patrino forlasis ŝin, Dio prenis ŝin al si. Ĉiutage anĝeloj ŝin vizitis, ĉiutage ŝi ĝuis Dian vizion, kio ŝirmis ŝin de ĉia malbono kaj faris ŝin brili de ĉio bona. Tiel ŝi atingis la dekkvaran jaron, ke eĉ malbonuloj pri ŝi nenion malbonan sciis raporti, sed ankaŭ ĉiuj bonuloj, kiuj konis ŝian vivon kaj konduton, trovis ŝin inda je admiro.

2 La ĉefpastro tiam publike informis, ke virgulinoj, kiuj vivis oficiale en la templo, kaj kiuj sian tempon plenumis, reiru hejmen, kaj laŭ kutimo de popolo kaj aĝo dediĉu sian atenton al nupto. Dum la ceteraj al tio obeis, nur la virgulino de la Sinjoro Maria respondis, ke al tio ŝi ne povas obei. Iliaj gepatroj ja koncedis ŝin al servado je la Sinjoro, sed krome ŝi mem promesis sian virgulinecon al la Sinjoro, kaj tiun ŝi neniam volis vundi per kiu ajn rilato kun viro. La ĉefpastro tamen en anima premateco, ĉar kontraŭ diro de la Skribo, kiu diras “Faru kaj plenumu promesojn al la Eternulo<sup>2</sup>” li ne kredis povi kontraŭi tiun voton, sed aliflanke ne kuraĝis enkonduki nekutiman por sia popolo vivmanieron, kaj tial li verdiktis, ke ĉe la baldaŭa festo ĉiuj gravuloj el Jerusalemo kaj la ĉirkaŭaj lokoj ĉeestu, por ke el ties konsilo li eksciu, kion li faru pri tiu ĉi tiel duba afero.

3 Kiam tio realiĝis, al ĉiuj kune plaĉis, ke la Sinjoron oni konsultu pri tiu afero. Dum ĉiuj estis en preĝo, la ĉefpastro proponis konsulti Dion: kaj tuj dum ĉiuj ĝin aŭdis de la orakolo kaj de la loko de l' preĝado venis voĉo, laŭ la eldiro de Jesaja, ke devas esti serĉite, al kiu tiu virgulino estu konfidata kaj donita en nupton. Estas ja klare, ke Jesaja diris: Eliros

---

<sup>2</sup> Psalmo 76:12.

markoto el la trunko de Jiŝaj kaj branĉo elkreskos el ĝiaj radikoj<sup>3</sup> kaj ripozos super ĝi la spirito de la Sinjoro: spirito de saĝo kaj de kompreno, spirito de konsilo kaj de forto, spirito de scienco kaj de pieco kaj plenigos ĝin spirito de timo antaŭ la Sinjoro.

4 Laŭ tiu profetaĵo ĉiuj viroj de la domo kaj de la familio de David, kiuj estis edziĝkapablaj kaj senedzinaj, alportu siajn bastonojn al la altaro, kaj kies bastono produktos floron, kaj sur kies pinto la spirito de la Sinjoro ekripos en la formo de kolombo, tiu devas esti la viro, al kiu la virgulino devos esti konfidita kaj nuptita.

**8** 1 Inter ili estis certa Jozef, viro el la domo kaj familio de David, grandaĝulo; dum ĉiuj siajn bastonojn laŭordone demetis, nur li detenis la sian. Tial, kiam nenio ŝajne kongruis kun la Dia voĉo, la ĉefpastro kredis, ke refoje necesas konsulti la volon de Dio: Tiu respondis, ke nur tiu el la indikitaj viroj, kiu sian bastonon ne alportis, devas edziĝi kun la virgulino. Tial do Jozef estis alvokita. Kaj kiam tiu sian bastonon alportis kaj kolombo, kiu aperis de la ĉielo, eksidis sur ties pinton, estis por ĉiuj klare, ke la virgulino nuptu kun li.

2 Laŭ la reguloj oni celebris la fianĉfeston, sed li mem reiris al sia urbo Betlehem, por ordigi sian domon, kaj prizorgi ĉiujn aferojn necesajn por la geedziĝo. Sed la virgulino de la Sinjoro, Maria, reiris al la domo de siaj gepatroj en Galileo, same kiel la ceteraj sep virgulinoj samaĝaj, kiuj kun ŝi trinkis la unuan lakton.

**9** 1 En tiuj tagoj, tamen, en la unua tempo de ŝia alveno en Galileon, Dio sendis al ŝi la anĝelon Gabriel, kiu sciigu al ŝi pri ŝia koncipiĝo, kaj klarigu al ŝi la manieron kaj realiĝon de ŝia gravedeco. Li alvenis kaj eniris kun grandega lumo la ĉambron, kie ŝi troviĝis, kaj per plej varma voĉo diris: Saluton, Maria, plej amata virgulino de la Sinjoro, virgulino gracoplena, la Sinjoro estas kun vi, benata vi estas antaŭ ĉiuj virinoj, benata pli ol ĉiuj homoj, kiuj naskiĝis ĝis nun.

---

<sup>3</sup> Jesaja 11:1.

2 Sed la virgulino, kiu la aspekton de anĝeloj jam bone konis kaj la ĉielan lumon ne trovis malkutima, ne ektimis pro la ĉiela vizio, nek konfuziĝis pro la grandega speciala lumado, sed konfuziĝis nur pro unu lia vorto, kaj ŝi komencis primediti, kio estu tiu tiel nekotima salutado, kaj kion tio celas kaj intencas. La anĝelo, kiun Dio inspiris, alrapidis: Ne timu, li diris: Maria, kvazaŭ per tiu ĉi saluto mi kovus ion kontraŭ via ĉasteco. Vi ja trovis gracon ĉe la Sinjoro, ĉar ĉastecon vi elektis: tial kiel senpeka virgulino vi gravediĝos kaj naskos filon.

3 Granda li estos, ĉar li regos de maro ĝis maro kaj de la rivero ĝis la limoj de la tersurfaco: Filo de la Plejalta li nomiĝos, ĉar kiu surtere naskiĝos humila, altege regos enĉiele: kaj donos al li la Sinjoro Dio la seĝon de lia patro David, kaj li regos en la domo de Jakob poreterne, kaj lia regno finon ne havos: mem li ja estas reĝo de l' reĝoj, kaj sinjoro de la regantoj, kaj lia trono estos en eternon de eterno<sup>4</sup>.

4 Je tiuj vortoj de la anĝelo la virgulino respondis, ne pro nekredo, sed nur por ekscii: Kiel tio povos okazi? Ĉar laŭ mia sanktpromeso neniam viron mi ekkonis, do kiel sen vira semo mi povos naski? Al tio respondis la anĝelo: Ne opiniu, Maria, ke laŭ homa kutimo vi gravediĝos: ĉar sen vira interveno virgulino vi naskos, virgulino vi nutros: la Sankta Spirito venos en vin kaj la forto de la Plejalta superombros vin kontraŭ ĉiuj bruloj de libido: kaj tial kio naskiĝos el vi estos sola nur sankta, ĉar sola koncipita sen peko, kaj via naskito nomiĝos Filo de Dio. Tiam Maria elstreĉis la manojn kaj turnis ĉielen la okulojn, kaj diris: Jen, la servistino de Dio, ĉar mi ja ne estas inda je la nomo de mastrino: okazu al mi laŭ Via diro.

5 Longe eble estus kaj por pluraj iom enuige, se en ĉi libreton ĉion ni volus enmeti, kion ni legis pri kio antaŭis aŭ sekvis la naskiĝon de la Sinjoro; do ni lasu ĉion, kio jam estas skribita en la evangelio, aŭ kio estas malpli raportinda.

---

<sup>4</sup> Laŭ Psalmo 72,8.

**10** 1 Venante el Judeo al Galileo, Jozef intencis nupti la virgulinon, kun kiu li estis fianĉigita: ĉar jam tri monatoj pasis kaj la kvara komenciĝis depost la tempo, kiam ili gefianĉiĝis. Ĉar intertempe iom post iom la utero de la gravedulino komencis ŝveli, ŝi komencis montri, ke ŝi naskos, kaj tion ŝi ne povis kaŝi al Jozef: ĉar laŭ la kutimo de fianĉo senprobleme li eniris al la virgulino kaj iom familiare parolante kun ŝi, li riproĉis ŝin pro la gravedeco. Sed anime li komencis varmiĝi kaj fluktui, ĉar li ne sciis, kion prefere li faru: ĉar li ne volis perfidi ŝin, ĉar li estis justulo, nek suspektigi ŝin pri adulto, ĉar piulo li estis. Tial li pripensadis, kaŝe nuligi la nupton kaj sekrete forsendi ŝin.

2 Dum tion li pripensis, jen anĝelo de la Sinjoro aperis al li en sonĝo, kaj diris: Jozef, filo de David, ne timu; tio estas: ne havu suspekton pro adulto kontraŭ la virgulino, aŭ pensu ion alian malbonan, kaj ne timu preni ŝin kiel edzinon; ĉar ja kio en ŝi naskiĝis kaj nun angorigas vian animon, ne estas faro de homo sed de la Sankta Spirito. Ĉi virgulino el ĉiuj eminenta ja sola naskos la Filon de Dio, kaj lian nomon vi nomos Jesuo, t.e. Savanto: ĉar li savos sian popolon de iliaj pekoj. Laŭ la ordono de la anĝelo do Jozef nuptis kun la virgulino, kaj ankaŭ tiam li ne ekkonis ŝin, sed ĉaste kiel protektanto li gardis ŝin. La naŭa monato depost la koncipiĝo alproksimiĝis, kiam Jozef, kunprenante kun si la edzinon kun ĉio kio estis necesa, ekiris al Betlehem, de kie li mem devenis. Okazis do, kiam tie ili estis, ke pleniĝis la tagoj, por ke ŝi nasku; kaj ŝi naskis sian unuenaskitan filon, kiel instruis la evangeliistoj, nian Sinjoron Jesuon Kriston, kiu kun la Patro kaj la Sankta Spirito vivas kaj regas en ĉiuj jarcentoj de jarcentoj.

---